

informilo por interlingvistoj

ipi

27-a jaro (tria serio) | n-ro 104 (2/2018) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

kaj Esperantic Studies Foundation

Enhavo

1. Antaŭparolo	2
2. Lastatempaj publikigaĵoj	2
Libroj	2
Artikoloj.....	2
Ĉapitroj.....	4
3. Simpozio pri multlingvismo en internaciaj organizaĵoj kaj internacia kunlaboro okazos la 10-an kaj 11-an de majo	5
4. Javier Alcalde parolos pri transnacia lingvo kaj konfliktaj memoroj de la Hispana milito.....	5
5. Lingvo de espero: aktivismo, manieroj engaĝiĝi kaj konceptoj de tempo ĉe Esperanto-parolantoj.....	5
6. Speciala numero de Trans-Kom: Faka Komunikado – Universitata Vidpunkto	6
7. Alvoko por kontribuoj: Multilingual Margins.....	6
8. Afrikaj Lingvoj en Publikaj Spacoj: Oportunoj kaj Defioj: Jara Konferenco (11an de majo 2018, Londono)	6
9. Aperis enciklopedio de eminentaj esperantistoj	7
10. La Heredaĵo kaj Testamentaĵo de Ludwik Lejzer Zamenhof: Inter Judismo kaj Esperanto	7
11. Lingvo kaj Sano – Etikaj kaj Politikaj Demandoj: alvoko por referaĵoj	8
12. ESF nomas novan kunordiganton de universitataj aferoj.....	8
13. Lastatempaj subvencioj de ESF	9
14. NASK-2018 : elstaraj instruistoj, kvar niveloj da kursoj, plus KTF	10
15. "Esperanto – lingvo kaj sistemo" en la Universitato de Innsbruck	10
16. Literatura Foiro februaro 2018: enhavo	10
17. Poeto Elizabeth Alexander pri Esperanto	11
18. Nova Libro pri forgesita revolucio.....	11
19. Lingvo en kulturo kaj kulturo en lingvo, la 29-an kaj 30-an de majo 2018.....	11

1. Antaŭparolo

Same kiel la antaŭaj numeroj, *Informilo por Interlingvistoj* kovras grandan diversecon de novaj eldonaĵoj, estontaj aranĝoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj informoj. Plejparte, ĝia enhavo similas al la enhavo de ĝia nova anglalingva eldono, *Information for Interlinguists*. Se vi ŝatus regule ricevi unu aŭ ambaŭ el tiuj ĉi eldonaĵoj kaj ne jam troviĝas en nia dissendolisto, sciigu nin (ipi@esperantic.org). Kiam aperos nova numero, ni informos vin pri tio, sendante al vi ligilon al la koncerna paĝo en la retejo de ESF (esperantic.org).

Nepre sendu al ni viajn novaĵojn pri lastatempaj publikigaĵoj, konferencoj, estonta aranĝoj ktp.!

Humphrey Tonkin

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

2. Lastatempaj publikigaĵoj

Libroj

Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj. Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2018. 320 p., il; 500 ekz. (Serio Scio, №10).
<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120.htm>

J.R.R. Tolkien the Esperantist: Before the Arrival of Bilbo Baggins. Edited by Oronzo Cilli, Arden R. Smith and Patrick H. Wynne (on Tolkien and Esperanto). Barletta (Italy): Cafagna Editore. 2017.
[http://tolkiengateway.net/wiki/J.R.R. Tolkien the Esperantist: Before the Arrival of Bilbo Baggins](http://tolkiengateway.net/wiki/J.R.R._Tolkien_the_Esperantist:_Before_the_Arrival_of_Bilbo_Baggins)

Globalización y lenguas internacionales. Identidades, discursos y políticas lingüísticas. El caso del Español, el Inglés y el Esperanto. Canale, Germán. Montevideo: Udelar, 2010. FHCE/CSIC.
<https://revistas.unc.edu.ar/index.php/RDPL/article/view/8499>. “El trabajo de Canale discute la relación entre globalización e imperialismo lingüístico a través de representaciones sobre tres lenguas que aspiran (con mayor o menor éxito) a formar parte del selecto grupo de lenguas internacionales: el inglés, el español y el esperanto. Por medio de un relevamiento bibliográfico y documental el autor discute la vinculación de estas lenguas con los conceptos de imperialismo lingüístico y globalización, al tiempo que compara los argumentos utilizados para promocionarlas como lenguas internacionales. La investigación forma parte del proyecto ‘Diversidad lingüística y globalización: políticas lingüísticas y discursos sobre la lengua’ (Fondo Clemente Estable, DicyT, MEC, Uruguay; período: 2007-2009; responsable: Dra. Graciela Barrios, UDELAR).”

Artikoloj

Hywel Coleman. 2017. Milestones in language planning and development aid. *Current Issues in Language Planning*. 18/4: 442-468. <https://www.tandfonline.com/eprint/5sG9VD8hQtGr9pClbyHn/full>

Cédric Villani. 2016. La langue de chez nous. *Café des maths. Images des mathématiques*. CNRS.
<http://images.math.cnrs.fr/La-langue-de-chez-nous.html>. An article by a winner of the Field Medal on the question of interlinguistic communication among mathematicians.

Reda Pabarčienė/Deimantė Veličkienė. 2018. Diálogos interculturales en las traducciones de los sonetos de William Shakespeare al lituano por Sigitas Geda (Cross-Cultural Dialogues in the Translations of William Shakespeare's Sonnets into Lithuanian by Sigitas Geda). *Alfinge. Revista de Filología*. http://scholar.google.co.uk/scholar_url?url=https://www.uco.es/ucopress/ojs/index.php/alfinge/article/download/10115/9591&hl=en&sa=X&scisig=AAGBfm0h05ndeikEh5SIqbOBADMZymMag&nossl=1&oi=scholaralrt. Includes discussion of translations into Esperanto.

Eric Schwitzgebel, Ta-Lung Huang, Linus & Higgins, Andrew & Gonzalez-Cabrera, Ivan. 2017. The Insularity of Anglophone Philosophy: Quantitative Analyses. *ResearchGate*. <https://www.researchgate.net/publication/320024671> The Insularity of Anglophone Philosophy Quantitative Analyses (working paper). “We present evidence that mainstream Anglophone philosophy is insular in the sense that participants in this academic tradition tend mostly to cite or interact with other participants in this academic tradition, while having little academic interaction with philosophers writing in other languages. Among our evidence: In a sample of articles from elite Anglophone philosophy journals, 97% of citations are citations of work originally written in English; 96% of members of editorial boards of elite Anglophone philosophy journals are housed in majority-Anglophone countries; and only one of the 100 most-cited recent authors in the Stanford Encyclopedia of Philosophy spent most of his career in non-Anglophone countries writing primarily in a language other than English. In contrast, philosophy articles published in elite Chinese-language and Spanish-language journals cite from a range of linguistic traditions, as do non-English-language articles in a convenience sample of established European-language journals. We also find evidence that work in English has more influence on work in other languages than vice versa and that when non-Anglophone philosophers cite recent work outside of their own linguistic tradition it tends to be work in English.”

Mary Jane Curry & Theresa Lillis. 2018. The dangers of English as lingua franca of journals. *Inside Higher Ed*. March 13, 2018. <https://www.insidehighered.com/views/2018/03/13/domination-english-language-journal-publishing-hurting-scholarship-many-countries>. “Is your first language English? If so, imagine that you are now required to write about your research using only Spanish or Japanese. Many scholars around the world are facing a parallel situation, with pressures to publish their work in English increasing markedly in the past two decades. Indeed, many people now assume that English is the global language of scholarly publishing. This claim is usually supported by evidence from the limited universe of around 27,000 journals included in the Web of Science (WoS) indexes -- most prominently, the Science Citation Index -- most of which publish in English. However, more than 9,000 peer-reviewed scholarly journals are being published in other languages, with French (3,500), German (2,700), Spanish (2,300) and Chinese (1400) contributing the highest numbers. Most of these journals are excluded from prestigious journal indexes, thus perpetuating the ideology that English is the global academic lingua franca.”

Rebecca Maksel. 2018. Why was the discovery of the jet stream mostly ignored? Maybe because it was published in Esperanto? *Air & Space Magazine*. April 2018. <https://www.airspacemag.com/as-next/as-next-may-unbelievablebuttrue-180968355>. “Had Japanese meteorologist Wasaburo Ooishi not been an Esperantist, U.S. scientists during World War II might have been more aware of a national vulnerability. Between 1923 and 1925, Ooishi completed almost 1,300 observations of fierce high-altitude winds, later named the jetstream. The somewhat eccentric Ooishi was not only the director of Japan’s Tateno atmospheric observatory but also the head of the Japan Esperanto Society, proponents of the artificially constructed language, created in the 1870s as a means of international communication. Ooishi announced his discovery of the swift, high-altitude river of air in

the Tateno observatory's annual reports, which he published in Esperanto. Not surprisingly, his research was ignored, and the U.S. military was caught off guard by two consequences of the invisible jetstream."

Lastatempaj artikoloj de Bernhard Tuidler, Bibliotekisto de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

- 2018. Bibliothek und Ideologie – Die Nationalbibliothek in der Zwischenkriegszeit zwischen Deutschnationalismus und Esperantosammlung. En: Johanna Rachinger (eld.): *Schatzkammer des Wissens. 650 Jahre Österreichische Nationalbibliothek*. Wien, 130-137.
- 2018. Esperanto en Aŭstrio ĉirkaŭ la unua mondmilito. En: Javier Alcalde, José Salguero (red.): *Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto*. Paris, 319-328.
- 2018. Vizitrekordo ĉe la Esperanto-muzeo en Vieno. *Libera Folio* (16.01.2018). <http://www.liberafolio.org/2018/01/16/vizitrekordo-ce-la-esperanto-muzeo-en-vieno/>
- 2017. Historiaj periodaĵoj nun rete traserĉeblaj. *Libera Folio* (02.10.2017). <http://www.liberafolio.org/2017/10/02/historiaj-periodaĵoj-nun-rete-traserceblaj/>
- 2017. Die Sammlung für Plansprachen und das Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek – Geschichte, Bestand und Projekte. *Bibliothek – Forschung und Praxis* 41/2, 185-192.
- 2017. Die Lingvo Internacia des Dr. Esperanto. *Forschungsblog der Österreichischen Nationalbibliothek* (20.07.2017). <https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/die-lingvo-internacia-des-dr-esperanto/>
- 2017. 100-a mortotago de Ludoviko Zamenhof. *Forschungsblog der Österreichischen Nationalbibliothek* (13.04.2017). <https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/100-a-mortotago-de-ludoviko-zamenhof/>
- 2017. Zum 100. Todestag des Esperanto-Erfinders Ludwik Zamenhof. *Forschungsblog der Österreichischen Nationalbibliothek* (13.04.2017). <https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/zum-100-todestag-des-esperanto-erfinders-ludwik-zamenhof/>
- 2017. „Wie Sie sehen, war Ihre Anregung, Esperanto zu lernen, nicht vergebens“. *Forschungsblog der Österreichischen Nationalbibliothek* (13.01.2017). <https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/wie-sie-sehen-war-ihre-anregung-esperanto-zu-lernen-nicht-vergebens/>

Ĉapitroj

Karen Madlener. 2018. *Do findings from artificial language learning generalize to second language classrooms?* In: *Usage-inspired L2 Instruction: Researched pedagogy* (Chapter 10). Amsterdam: John Benjamins.

<https://books.google.co.uk/books?hl=en&lr=&id=OURJDwAAQBAJ&oi=fnd&pg=PA211&ots=LTLNaFg7y0&sig#v=onepage&q&f=false>

3. Simpozio pri multlingvismo en internaciaj organizaĵoj kaj internacia kunlaboro okazos la 10-an kaj 11-an de majo

Lingvoj kaj lingvaj diferencoj estas dimensio ofte subtaksata aŭ ignorata dimensio en la efikeco de Unuiĝintaj Nacioj sur multaj kampoj – de administrado ĝis ekonomia kaj socia evoluigo, de packonservado al diplomatio, kaj en multaj ceteraj terenoj. La Studogrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, fondita parte laŭ iniciato de Universala Esperanto-Asocio, organizas jam de kelkaj jaroj ĉiujaran simpozion pri aspektoj de lingvoj en rilato al UN. La ĉi-jara simpozio, “Multlingvismo en internaciaj organizaĵoj kaj internacia kunlaboro,” okazos jaŭdon kaj vendredon, la 10-an kaj 11-an de majo, ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, komence je la 9-a horo la 10-an de majo.

La nuna simpozio celas atentigi pri tiuj demandoj kaj kreskigi interesiĝon pri ili. Kontribuaĵoj pritraktos la defiojn de subtenado de multlingvismo en organizaĵoj kaj en lokoj de internacia kunlaboro trans malsamaj sektoroj (ekzemple komerco, diplomatio, ekonomiko) aŭ komunumoj. Inkluzivitaj estos teoriaj kaj metodikaj studoj, kune kun tiuj kiuj frontas specifajn praktikajn defiojn – precipe referaĵoj kiuj rekte fokusiĝas je la laboro de la UN-sistemo kaj aliaj internaciaj institucioj, aŭ esploroj kun evidentaj implicoj al ilia laboro. La ĉefparolanto en la simpozio estos la konata ekonomiisto kaj lingvisto Michele Gazzola (Humboldt-Universitato, Berlino).

Por pliaj informoj pri la simpozio, aŭ por aliĝi, iru al www.languageandtheun.org. Ĉe la retejo oni povas ankaŭ legi la finan raporton de la simpozio de 2017, pri “Lingvo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kaj Vundeblaj Homgrupoj.”

4. Javier Alcalde parolos pri transnacia lingvo kaj konfliktaj memoroj de la Hispana milito

La ĉiujara prelegserio Buchanan prezentos ĉi-jare Esperanto-rilatan temon: la 9an de majo 2018 (16:00) ĉe la Universitato de Liverpulo D-ro Javier Alcalde prezentos la prelegon “Transnacia lingvo kaj konfliktaj memoroj de la Hispana milito” (“Transnational language and conflicting memories of the Spanish Civil War”): <http://www.esperantoresearch.org.uk/site/lecture>

Resumo: www.esperantoresearch.org.uk/sites/default/files/site/files/javier_alcalde_9.5.2018.pdf

5. Lingvo de espero: aktivismo, manieroj engaĝiĝi kaj konceptoj de tempo ĉe Esperanto-parolantoj

La 2an de marto 2018 Guilherme Moreira Fians, MA (Fakultato pri Socia Antropologio, Universitato de Manchester) estis gastparolanto ĉe seminario de ACLC (Amsterdam Center for Language and Communication) kiu okazis ĉe la Amsterdama Instituto pri Homscienca Esplorado (Amsterdam Institute for Humanities Research, AIHR). Li prezentis la prelegon “Espero pri la Lingvo de Espero: Aktivismo, manieroj engaĝiĝi kaj konceptoj de tempo ĉe Esperanto-parolantoj” (“Hoping for the Language of Hope: Activism, ways of engagement and conceptions of time among Esperanto speakers”).

Resumo: <http://aihr.uva.nl/content/events/lectures/2018/03/2-aclc-seminar-moreira-fians.html>

6. Speciala numero de Trans-Kom: Faka Komunikado – Universitata Vidpunkto

La tria numero de la volumo 10 (2017) de *Trans-Kom* estas dediĉita al la temo "Faka Komunikado – Universitata Vidpunkto", kun la sekvaj eroj:

- **Franziska Heidrich.** Die Fachkommunikationswissenschaft: Einführung in die Sonderausgabe von *trans-kom*
- **Benedikt Lutz.** Modelle für die verständliche Fachkommunikation. Das Spannungsfeld zwischen wissenschaftlichem Anspruch und praktischer Anwendbarkeit
- **Claudia Villiger.** Texte und Visualisierungen im digitalen Nutzungskontext der Technischen Kommunikation
- **Marion Wittkowsky.** Empirische MÜ-Forschung: Betrachtung der Sprachregulierung im Kontext regelbasierter maschineller Übersetzung (RBMÜ)
- **Swenja Schum.** Barrierefreiheit als Herausforderung in der Fachtextübersetzung
- **Rafik Jamoussi.** Background Knowledge Explication: Blueprint for a Theoretical Model
- **Hinde De Metsenaere & Sonia Vandepitte.** Towards a Theoretical Foundation for Explication and Implication

Trans-Kom estas universitata revuo redaktata de Leona Van Vaerenbergh (Universitato de Antwerp) kaj Klaus Schubert (Universitato Hildesheim), kun Franziska Heidrich kiel gastredaktanto de tiu ĉi numero. La artikoloj estas haveblaj en la germana, kun resumo angle: abstracts in English: www.trans-kom.eu.

7. Alvoko por kontribuoj: Multilingual Margins

La redaktantoj de la revuo *Multilingual Margins: A journal of multilingualism from the periphery* invitas eventualajn aŭtorojn submeti por ebla publikigo artikolojn bazitajn sur originalaj esploroj pri temoj rilataj al multlingvismo kaj marĝeneco, malkoloniiga teorio kaj praktiko, la Suda teorio. Ankaŭ proponoj pri specialaj numeroj pri tiuj ĉi temoj estas bonvenaj. Ni invitas la aŭtorojn submeti elektronikajn kontribuojn al gwilliams@uwc.ac.za aŭ cstroud@uwc.ac.za. Ĉiuj artikoloj estos recenzitaj per rigora kontrolado de internacia teamo de kunlaborantoj. Pli da informoj: <http://epubs.ac.za/index.php/multiling/index>

8. Afrikaj Lingvoj en Publikaj Spacoj: Oportunoj kaj Defioj: Jara Konferenco (11an de majo 2018, Londono)

La grupo pri lingvoj LiA SIG (Language in Africa Special Interest Group - <https://liasig.wordpress.com>) de la brita asocio BAAL (British Association for Applied Linguistics) anoncas sian Jaran Konferencon: la 11an de majo 2018, de 10:00 atm ĝis 5:30 pm. Loko: School of Languages, Cultures and Linguistics (SOAS, Universitato de Londono). Temo: "Afrikaj Lingvoj en Publikaj Spacoj: Oportunoj kaj Defioj" ("African Languages in Public Spaces: Opportunities & Challenges"). Profesoro Leketi Makalela estos la kongresa ĉefparolanto kaj prezentos prelegon "Re-imagi multlingvismon kiel kulturen kompetentecon en Afriko: likantaj limoj, Ubuntu kaj multlingvado en publikaj spacoj" ("Re-imagining multilingualism as a cultural competence in Africa: leaking boundaries, Ubuntu and multilingualism in public spaces.") Profesoro Makalela estas Ĉefo de la Fakoj pri Lingvoj, Alfabetigoj kaj Literaturoj ĉe Wits School of Education, Universitato de Witwatersrand. Bonvolu registriĝi ĝis la 30a de aprilo 2018 por ke la

organizantoj povu mendi manĝaĵojn por tiu tago. Tio ĉi estas inkluzivita en la kotizo de £25 por membroj de BAAL, £35 por ne-membroj, £20 por studentoj kiuj ne estas membroj de BAAL, kaj £18 por studentoj kiuj estas membroj de BAAL. Postdiplomaj studentoj estas aparte bonvenaj. Formularoj por registriĝi estas haveblaj de la retejo de LIASIG: <https://liasig.wordpress.com>. Bonvolu sendi informpetojn al Elvis Yevudeuy, yevudeye@aston.ac.uk

9. Aperis enciklopedio de eminentaj esperantistoj

Dank' al subvencio de ESF al rusaj ĵurnalistoj Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, lastatempe aperis la libro *Nia Diligenta Kolegaro*, kompilaĵo de 200 detalaj biografioj de eminentaj esperantistoj, de la komenco de la lingvo ĝis nun. Inter tiuj biografioj troviĝas esperantistoj aktivaj en la organizado de la Esperanto-movado kaj en la kampoj de informado (ekde gazetaro kaj radio ĝis sociaj retoj), edukado, scienco, politiko, komerco kaj artoj (literaturo, muziko, teatro, vidaj artoj). Ĉiu artikolo inkluzivas foton de la individuo kaj bibliografion de la verkoj de aŭ pri tiu persono. Kelkajn jarojn daŭris la intensa esplorado por kompili tiun ĉi 320-paĝan libron, kiu kovras la lingvon de la komenco, 1887, ĝis hodiaŭ. Halina Gorecka estas la redaktoro kaj Aleksander Korĵenkov estas la eldonisto de la populara monata revuo *La Ondo de Esperanto*. Korĵenkov estas ankaŭ la aŭtoro de, inter alie, ampleksa biografio de L.L. Zamenhof: *Homarano*, 2009. Havebla ĉe <https://katalogo.uea.org/>.

[Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2018. Pli da informoj: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120.htm>]

10. La Heredaĵo kaj Testamentaĵo de Ludwik Lejzer Zamenhof: Inter Judismo kaj Esperanto

De la 13a ĝis la 15a de decembro 2017, Muzeo de la Historio de Polaj Judoj POLIN (Museum of the History of Polish Jews -- Varsovio, Pollando), Universitato de Amsterdamo, Universitato de Turino, kaj Universitato Humboldt en Berlino organizis atelieron kiu fokusiĝis pri la ekzamenado de la heredaĵo de Ludwik Lejzer Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto kaj la kreinto de komunikiĝmaniero portata de universala homaranismo. La projekto debatis la demandon pri kiom multe tiu unika potencialo de Esperanto povas esti atribuita al judaj intelektulaj tradicioj. La celo de la evento estis kunigi spertulojn en la kampo de Esperantologio, Judeco (*Yiddishkeit*) kaj Judismo por klarigi kaj la heredaĵon de Zamenhof kaj lian testamentajaĵon laŭ tri dimensioj: lingvistiko, filozofio kaj kulturo. La ateliero kovris taŭge larĝan historian kuntekston. La 14an de decembro 2017 venis kiel speciala preleganto Profesoro Federico Gobbo (Universitato de Amsterdamo), kiu prezentis prelegon "Ĉu eblas por ĉiuj paroli la saman lingvon? La historio de Ludwik Zamenhof kaj Esperanto" ("Is it Possible for all People to Speak the Same Language? The Story of Ludwik Zamenhof and Esperanto"). Video YouTube kaj plena teksto de la prelego estas haveblaj ĉe <http://www.polin.pl/en/event/is-it-possible-for-all-people-to-speak-the-same-language>

11. Lingvo kaj Sano – Etikaj kaj Politikaj Demandoj: alvoko por referaĵoj

La reto HCALM invitas proponojn por sia jara konferenco de 2018 pri la temo lingvo kaj sano – etikaj kaj politikaj demandoj. Lingvo kaj sano interrilatiĝas en diversaj manieroj, ekde la demandoj pri provizo de fizika kaj mensa sanprizorgo en multlingvaj socioj, ĝis san-alfabetismo kaj komunikado inter malsanuloj, kuracistoj kaj politikistoj, kaj la ĝenerala konversacio pri sano kaj bonfarto. Laŭ la forte interfaka naturo de la komunumo de HCALM-esploristoj, la konferenco bonvenigas proponojn kiuj kunigas teoriojn, kadrojn, konceptojn kaj metodojn de larĝa gamo de fakoj en medicinaj sciencoj, sociaj sciencoj, kaj homaj sciencoj. Ĝi ankaŭ invitas proponojn, kiuj traktas la multajn etikajn kaj politikajn demandojn ĉe la kruciĝo de publika sano kaj lingva (inkluzive de gestolingva) politiko, larĝe interpretataj.

Konferencaj parolantoj: Mark Fettes (Edukado, Simon Fraser University), Eran Tal (Filozofio, McGill). La ĉefa lingvo de la konferenco estos la angla, sed angla-franca kaj angla-gestolingva interpretado estos havebla se ĝi estos bezonata.

Resumoj (proksimume 300 vortojn) estu senditaj al Daniel Weinstock kaj Yael Peled (hcalm-network.ihsp@mcgill.ca) ĝis la 8a de aprilo 2018. La evento okazos la 6-7an de septembro 2018, ĉe Hôtel de l'ITHQ, Montreal (Canada). Pliaj informoj: <http://www.mcgill.ca/channels/channels/event/2018-research-conference-call-papers-language-and-health-ethical-and-policy-issues-special-focus-285423>

12. ESF nomas novan kunordiganton de universitataj aferoj

ESF lastatempe anoncis enoficigon de nova kunordiganto de universitataj aferoj kiel posteulo de Asya Pereltsvaig, kiu retiriĝis el tiu posteno fine de 2017 por transiri al nova posteno. La nova kunordiganto estos Angela Tellier, el Britio. Ŝi havos respondecon ligi kontaktojn kun universitatoj kaj aliaj fakuloj kiuj okupiĝas pri Esperanto kaj interlingvistiko ĉu kiel instruantoj ĉu kiel esplorantoj, ne nur en Norda Ameriko sed ankaŭ tra la tuta mondo. La celo de ŝia rolo estos intensigi la kunlaboron sur tiu tereno nacie kaj internacie. Ŝi samtempe rolos kiel kunordiganto de universitata agado por CED.

D-rino Tellier estas post-doktoriĝa esploristo ĉe la Universitato de Essex, kaj honora fratulo de la Universitato de Liverpolo, kie ŝi kunordigas la lektoraton Buchanan. Ŝi interesiĝas pri la propedeŭtika rolo de Esperanto kaj ĝia efiko sur la evoluo de metalingva konscio ĉe infanoj; tiukampe, ŝi multon publikigis. Interalie, ŝi kunordigis la kvinjaran britan enlernejan esplorprojekton “Springboard to Languages”. Ŝi ankaŭ interesiĝas pri la vivo kaj verkoj de nebone konataj Esperantistoj, kiuj grave influis la mondon: ŝi nun verkas biografion pri la interlingvisto Profesoro William Collinson.

D-rino Tellier eklaboros en sia posteno en septembro 2018. Intertempe, ESF pretigos raporton pri la instruado kaj esplorado sur tiu ĉi kampo verkotan de Juan Diego Diaz Bautista (Sevilo), kaj d-ro Xavier Alcalde (Barcelono) organizos simpozion tuj post la Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono kiu konsideros tiun raporton kaj pridiskutos la rolon de Esperanto kaj interlingvistiko en la lingvistiko kaj sociaj sciencoj kaj inverse – nome la rolon de lingvistiko kaj sociaj sciencoj en Esperanto kaj interlingvistiko.

13. Lastatempaj subvencioj de ESF

Fine de 2017, ESF donis kelkajn gravajn subvenciojn por subteni Esperanton, kiuj celas konservadon de Esperanto-historio kaj la subtenon de bibliotekoj, antaŭenigo de lingvolernado en Usono kaj universitatan subtenon.

Konservado de Esperanto-historio kaj subteno al bibliotekoj

La donacoj de ESF al Biblioteko Du Bois de Universitato de Masaĉuseco kaj la Biblioteko Firestone de Universitato Princeton helpas konservi la historion de Esperanto-societoj en Nord-Ameriko kaj helpas konstrui bibliotekajn kolektojn pri Esperanto kaj rilataj kampoj. Sub la gvidado de Robert Cox, Direktoro pri Specialaj Kolektoj, la Biblioteko Du Bois de la Universitato de Masaĉuseco, Amherst, lastatempe eklaboris por kolekti la arĥivojn de antaŭaj kaj nuntempaj lokaj Esperanto-societoj, historiajn korespondaĵojn inter esperantistoj kaj presitajn efemeraĵojn kiuj prilumas la historion de Esperanto en Usono. La Lingvo Internacia havas pli ol jarcenton da historio en Usono kaj Kanado, kaj ĝi ricevas pli kaj pli da atento de usonaj universitatoj kaj esploristoj pri usona soci-historio kaj lingvistiko. La biblioteko Firestone ĉe la universitato Princeton, kie kelkaj profesoroj aktivas pri instruado kaj esplorado de Esperanto, strebas akiri novajn materialojn, precipe presitajn librojn, kiujn oni disponigos al esploristoj pri tiu kampo. ESF esperas ke tra la jaroj, Firestone, surbaze de siaj jam konsiderindaj kolektoj, fariĝos unu el la ĉefaj nord-amerikaj bibliotekoj en la kampo de planlingvoj.

Krome, ESF donis al la biblioteko Hector Hodler malgrandan mastruman subvencion de 8000 USD por helpi pri katalogigo kaj diversaj administraj laboroj. Unu el la plej grandaj kolektoj de Esperanto-libroj kaj aliaj materialoj en la mondo, la biblioteko troviĝas en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo, Nederlando. La Fondaĵo ankaŭ sukcesis aranĝi transportadon de paperoj de la antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto, D-ro André Albault, kiu mortis lastatempe, al la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno, kiu posedas la plej grandan kolekton de esplormaterialoj pri Esperanto kaj planlingvoj.

Antaŭenigo de lingvolernado en Usono

La donaco de ESF al Esperanto-USA, la usona landa Esperanto-asocio, estas celata por subteni la strebojn de Esperanto-USA provizi servojn al novaj esperantistoj en Usono. Pli ol miliono da homoj studas Esperanton per la lingvolerna apo Duolingo por anglalingvanoj, kaj multaj el ili estas en Usono.

Universitata subteno

Signifa donaco de ESF helpis garantii la estontecon de studoj pri Esperanto kaj interlingvistiko ĉe unu el ĉefaj nederlandaj universitatoj. La tuta sumo de 27.000 USD (21.700 eŭroj), donacita al la Fonduso Middelkoop de UEA, estos uzata por certigi la estontecon de la katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo. La katedro, nun okupata de profesoro Federico Gobbo, Italio, havas longan kaj elstaran historion. Ĝi komenciĝis iom post la Dua Mondmilito kiel lektorato, kiu transiris al la statuso de privata profesoreco ĉirkaŭ dudek jarojn poste. Esperanto kaj interlingvistiko, kutime instruataj kiel branĉo de lingvistiko, inkluzivas la studon de planlingvoj kaj ilia socia kaj lingvistika kunteksto.

14. NASK-2018 : elstaraj instruistoj, kvar niveloj da kursoj, plus KTF

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) -- intensa, merga kursaro en Esperanto, kiu okazas seninterrompe ekde 1969 kun subteno de ESF -- estos larĝigita ĉi-jare: estos kvar niveloj de instruado (inkluzive de la komencanta kurso, la unuan fojon en multaj jaroj), famaj instruistoj (Katalin Kováts, Anna Löwenstein, José Antonio Vergara kaj Thomas Alexander) kaj la speciala gastparolanto: la antaŭa prezidanto de UEA, Renato Corsetti. Aldone, samtempe kun NASK denove okazos KTF: Kino-Teatro-Festo. Pli da informoj: <http://nask.esperanto-usa.org/venonta/>.
Video de Globeto: <https://youtu.be/UbnxwKbpf2I>. NASK okazos inter la 3a kaj la 12a de julio 2018, Raleigh, NC, Usono.

15. "Esperanto – lingvo kaj sistemo" en la Universitato de Innsbruck

En la somera semestro 2018 en la universitato de Innsbruck Bernhard Tuidler, teamestro de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, gvidos la kurson "Esperanto – lingvo kaj sistemo". La kurso donos enkondukon pri Esperanto kaj ĝenerale enrigardon pri teoriaj kaj praktikaj aspektoj de planlingvoj. La kurso, al kiu aliĝis pli ol 30 gestudentoj, daŭrigos la longan tradicion de scienca instruado, kiun dum jardekoj realigis prof. d-ro Hermann Ölberg (1922–2017), albanologo kaj interlingvisto.

Pliaj informoj: <https://edukado.net/kursejo?kid=26843>
https://lfuonline.uibk.ac.at/public/lfuonline_lv.home?sem_id_in=18S&suche_in=tuidler+bernhard

16. Literatura Foiro februaro 2018: enhavo

Redakcio: Serenan daŭrigon, kara leganto! (novjara saluto)	3
Tomasz Chmielik: Modelo por proza stilo traduka (nia kovrilo)	4
Elena Popova: Arbare, kun Henri Rousseau hajkaro	16
Redakcio: Silfer kaj Ŝtimec la plej popularaj Nobel-kandidatoj	17
Zlatoje Martinov: Kion signifas kandidati al Nobelo (intervjuo)	18
Mirela Ivanova (Venelin Mitev): Tiom da vintro en ni kaj ĉirkaŭe (balkana prozo)	21
Zlatoje Martinov: Traduko de traduko: kial ne? (tradukarto)	28
Perla Martinelli: La Femina Manifesto de PEN Internacia (speciale PEN)	34
Helmi Martikainen: Pli ol dek kvin mil... (feminismo)	36
Vinko Oslak: Hannah inventis nekutiman lupeon (filozofio)	38
Dimitrije Janičić recenzas: Forfuĝo de la vorto "doloro" (en vitrino)	55
Carlo Minnaja recenzas: Kampara knabo (en vitrino)	57
Fernando Pita recenzas: Pasintaj eĥoj de la nuntempo (en vitrino)	60
Marie-France Conde Rey: Ne, mia filino, vi ne iros danci: feminaj rigardoj... (kino)	32
Fernando Pita: Esperantisto remalkovris la tupian lingvon (2) interlingvistiko	46
Zlatoje Martinov: Kineje... humuro	50
Valentin Melnikov recenzas: Fontoj plej diversaj (en vitrino)	53

17. Poeto Elizabeth Alexander pri Esperanto

Elizabeth Alexander, poeto, estis lastatempe nomata prezidanto de la granda usona Fondaĵo Mellon. Inter ŝiaj poemoj: “Unua Afrik-Usona Esperantisto,” pri William Pickens (1881-1954). Inter ŝiaj deklaroj: “Estas tiel bela espero en la ideo de Esperanto, la deziro komuniki trans lokoj kaj limoj...” Vidu <http://www.autodidactproject.org/other/pickens-alexander.html>

18. Nova Libro pri forgesita revolucio

La 6-an de marto, en aranĝo en la londona parlamentejo aŭspiciita de la kartvela ambasado kaj la Ĉiupartia Parlamenta Grupo pri Kartvelio, Zed Books lanĉis novan libron de esperantisto Eric Lee, kun titolo *The Experiment: Georgia's Forgotten Revolution 1918-1921*. La libro estis jam tradukita en Esperanto de sia aŭtoro kaj en tiu senco sekvas la verkon de Ulrich Lins, *Dangerous Language* (2 vols., 2016-2017) kaj *La danĝera lingvo* (2016) en tio, ke ĝi priskribas en kaj angla kaj Esperanto ŝlosilan periodon en la jaroj post la kolapso de la Rusa Cara Imperio.

19. Lingvo en kulturo kaj kulturo en lingvo, la 29-an kaj 30-an de majo 2018

Fine de 2017 la Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sacz, Pollando, sukcese aranĝis kunlaboron kun la Instituto de Fremdaj Lingvoj en tiu urbo. Komune oni sukcesis organizi grandan eventon kunlige kun la Zamenhofaj Tagoj (14-17 decembro 2017) kaj bonaj kunlaboraj rilatoj plu daŭras. Rezulte la Centro ricevis inviton eniri la programon de Scienca Konferenco organizata de la Instituto, “Lingvo en kulturo kaj kulturo en lingvo,” la 29-an kaj 30-an de majo. Ĝi enhavas Esperanto-blokon, havantan temojn rilate al Esperanto. Jam aliĝis kiel parolantoj Nina Daniljuk el Ukrainio kaj Roman Dobrzyński en Pollando.

Klarigis loka Esperanto-organizanto Halina Komar, “Ni havas ŝancon eniri en la socion de lingvistoj, kiuj gvidas siajn lingvajn fakojn en altaj lernejoj, eĉ ne sciante, ke ekzistas Esperanto. Presotaj kaj disigitaj Sciencaj Kajeroj kaj postkonferenca Libro la unuan fojon montrus ankaŭ la lingvon Esperanto (kun traduko al angla, germana, pola aŭ rusa). Mi certas, ke indas pruvi nian lingvon kaj ideon en la ekster-Esperantuja mondo...”

La organizantoj invitas interesatojn al partopreno, eĉ proponante gastigadon ĉe lokaj esperantistoj dum la Konferencaj tagoj. Sube vi trovos ligilojn por informiĝi pri la programo kaj kondiĉoj. Oni atendas viajn proponojn, konsilojn ktp.

Pliaj informoj : <https://konferencja2018ns.weebly.com>

Eldonas Ipl: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis, kun helpo de Raúl J. García. Redakcio (kontribuoj, ricevado de la bulteno, k.s.): ipi@esperantic.org. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj.